

Jesuo,
Vi scias, kio estas la plej
bona por mi.
Mi ne povas fari ĉi tion sole.
Mi bezonas Vian helpon .
Malfermu la pordojn, kiuj
estas fruktodonaj.
Fermu la pordojn, kiuj estas
malĝustaj.
Montru la vojon.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libro servo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Fido – konfido	99
Kompreni, protesti, engaĝiĝi	103
Gaja historio kun serioza instruo	105
Orma la ruĝa – du volumoj	106
<i>Fake news</i> – falsaj novaĵoj	108
Apostoloj kaj iliaj atributoj	112
La vibrisoj de katoj	114
Kvar knabinoj	115
Survoje – ien aŭ reen	116
Alternativoj al MAL-vortoj	118
Informetoj	119
Abrahamo iras for	120

Redaktoraĵoj

Kara leganto, espereble vi ne trovas grandan diferencon, sed mi devis ŝanĝi la aplikan programon por fari la gazeton. Bedaŭrinde la antaŭa, kiun mi uzis jam de la komenco de mia redaktado de Dia Regno, sufiĉe longe ne plu estas subtenata kaj refreŝigata. Do mi finfine ŝanĝis. Tio kompreneble influis la rapidecon, per kiu mi faras la kompostadon, ĉar mi samtempe kun la kompostado ankaŭ devas lerni la programon. Plej grava tamen estas, ĉu tio influos la printadon? Mi esperas ke ne. Espereble mi trovis la ĝustan manieron produkti la pdf-n por la printejo.

Kutime mi publikigas en la kvina numero informon pri la sekvontjara kongreso. Bedaŭrinde tio ĉi-foje ne okazas, ĉar la detaloj ankoraŭ ne estas fiksataj. Sed la laboro progresas kaj en la sekvonta numero vi povos informiĝi pri ĝi (kaj ankaŭ aliĝi).

Ĝis sekvontnumere mi deziras al vi bonan kaj belan aŭtunon kaj Dia-Regno-legadon.

Fido – konfido

Prediko dum kongreso en Révfülöp 2019

Philippe Cousson, FR

Karaj gefratoj, la ligo inter ĉi tiuj tekstoj ne estas unuavide evidenta. Kie do estas menciita la fido en la teksto de la evangelio? Kaj tamen, multfoje en ĝi troviĝas la ideo de konfido. Kaj fido vere proksimas al konfido.

La teksto de la epistolo al la Hebreoj estas konata. “Per la fido ...” ktp, kaj la aŭtoro mencias tutan serion de personoj el la Hebra Biblio, nia Malnova Testamento, herooj de la fido de Izraelo. Kaj ĉi tiuj personoj, patriarkoj, profetoj, estas cititaj kiel ekzemploj.

Nu, ŝajnas al mi, ke tiu peco el la teksto de Luko (vidu paĝon 100) donas al ni kelkajn ŝlosilojn por kompreni tion, kio povas esti, kio devas esti, vivo de fido, de tiu fido, kiu vivigis tiujn glorajn antaŭulojn.

Se ni zorge atentus ĉi tiujn tekstojn, ni vidas la klaran opozicion faritan inter timemo, timo unuflanke kaj fido, konfido, aliflanke. La antikvaj patriarkoj laŭ la priskribo de la aŭtoro de la epistolo al la Hebreoj sendube havis nenium timemon, nenium timon. Ili antaŭeniris, al la nekonateco, al la promeso, al la espero.

Hebreoj 11: 1-9

Kaj la fido estas realigo de esperataĵoj, provado de aferoj ne vidataj. 2 Ĉar per tio la antikvuloj ricevis bonan ateston. 3 Per la fido ni komprenas, ke la mondaĝoj estas kreitaj per vorto de Dio, tiel ke tio, kio estas vidata, ne estas farita el aperantaĵoj. 4 Per la fido Habel oferis al Dio pli bonan oferon ol Kain, per kio li ricevis ateston, ke li estas justa, ĉar Dio atestis pri liaj donacoj; kaj per ĝi li, mortinte, ankoraŭ parolas. 5 Per la fido Hanoŝ estis transportita, por ne vidi morton; kaj li ne estis trovata, ĉar Dio lin transportis; ĉar antaŭ lia transporto estis atestite pri li, ke li plaĉis al Dio; 6 kaj sen fido neeble estas plaĉi al Li; ĉar necese estas, ke tiu, kiu alvenas al Dio, kredu, ke Li ekzistas, kaj ke Li fariĝas rekompencanto al tiuj, kiuj Lin diligente serĉas. 7 Per la fido Noa, avertite pri la ankoraŭ ne viditaj aferoj, kun pia timo konstruis arkeon por la savado de sia domo; per kio li kondamnis la mondon, kaj fariĝis heredanto de la justeco laŭ fido. 8 Per la fido Abraham, vokite, obeis eliri en lokon, kiun li estis ricevonta kiel heredajon; kaj li eliris, ne sciante, kien li iras. 9 Per la fido li fariĝis pasloĝanto en la lando de la promeso, kiel lando fremda, loĝante en tendoj kun Isaak kaj Jakob, kunheredantoj de la sama promeso;

Jehozkel 33:10-16

10 Kaj vi, ho filo de homo, diru al la domo de Izrael: Vi diras: Niaj kulpoj kaj pekoj estas sur ni, kaj de ili ni konsumiĝas; kiel do ni povas vivi? 11 Diru do al ili: Kiel Mi vivas, diras la Sinjoro, la Eternulo, Mi deziras ne la morton de malvirtulo, sed ke la malvirtulo detumu sin de sia vojo kaj restu vivanta. Detumu vin, detumu vin de viaj malbonaj vojoj! kial vi mortu, ho domo de Izrael? 12 Kaj vi, ho filo de homo, diru al la filoj de via popolo: La virteco de virtulo ne savos lin en la tago de lia krimo, kaj malvirtulo ne falos pro sia malvirteco en la tago, kiam li detumos sin de sia malvirteco; tiel same virtulo en la tago de sia peko ne povas resti vivanta kun ĝi. 13 Se Mi diros al la virtulo, ke li vivos, kaj li, fidante sian virtecon, faros krimon: tiam lia tuta virteco ne estos memorata, kaj li mortos pro sia krimo, kiun li faris. 14 Kaj se Mi diros al la malvirtulo, ke li mortos, sed li detumos sin de sia peko kaj agados juste kaj virte; 15 se la malvirtulo redonos la garantiatajn, repagos la rabitaĵojn, agados laŭ la leĝoj de la vivo, ne farante malbonaĝojn: tiam li restos vivanta kaj ne mortos. 16 Ĉiuj liaj pekoj, kiujn li faris, ne estos rememortaj: li agas juste kaj virte, kaj tial li restos vivanta.

Estas iel kvazaŭ la volo esti certa pri la estonteco mortigas la esperon, disigas de la fido.

Kaj ĉi tiuj kelkaj versikloj de Luko ne diras ion alian. La vorto, kiun Dio liveris, valoras pli ol ĉia materia certeco, ol ĉia certigita protekto ; sed ĉio ĉi tio, sen iu ajn alia garantio ol ĉi tiu donita vorto.

Estas neniu kialo timi, plaĉis al la Patro doni al vi la Regnon. Vi povas kredi lian vorton, aŭ ne kredi ĝin. Vi povas havi tre malprecizan ideon pri kio ekzakte temas la Regno, pri kiu li parolas, aŭ vi povas havi pli precizan ideon ; sed estas neniu certeco krom tiu ĉi donita vorto. Ĉiuokaze ĉi tiu Regno valoras pli ol ĉiuj surteraj posedaĵoj, materiaj, ol ĉi tiuj posedaĵoj, sur kiuj ni apogas nin por permesi al ni vivi, por daŭre vivi. Nu, li diras al ni, ke ni faras krudan eraran kalkulon. Al kio ĉio helpas al ni finfine, kiam nia vivo estos ĉe la fino? Nenio.

Kie estas via trezoro, tie estas via

koro. Bone konata biblia sentenco. Iuj eĉ kantis ĝin. Ni pripensu. Kiel utilas trezoro, se ne por prepari al si estontecon, aŭ estontecon por la siaj? Nu, kiel pri tiu, kiu volis konstrui al si pli grandajn grenejojn, Jesuo diris, ke tio estas senutila. Ĉiamaniere neniu regas la daŭrigon de sia vivo. Do lasu ĝin en la manoj de tiu, kiu amis nin ĝis doni sian vivon, en la manojn de tiu, kiu promesis al ni la Regnon, kiu donis al ni la Regnon.

Atentu, mi ne diras, ke estas senutile esti singarda, esti saĝa, esti prudenta. Jesuo ankaŭ havas kelkajn parabolojn pri tio. Simple, ni ne devas konstrui nian tutan vivon sur tio, fari el ĝi la bazon de la ekzisto. Nia garantio, nia certeco, nia espero estas en Dio. De li ni ricevas la rimedojn por daŭrigi, se ni akceptas, ke ni ricevas ilin de li. Kaj se ni ricevas ilin de li, tio estas ankaŭ por uzi ilin por lia servo. El tio, ĉi tiuj paraboloj de la sklavo kaj la forestanta mastro.

Luko 12: 32-48

32 Ne timu, malgranda grego; ĉar bone plaĉis al la Patro doni al vi la regnon. 33 Vendu viajn posedaĵojn, kaj donu almozon; faru por vi monujojn, kiuj ne fariĝos malnovaj, trezoron ne mankontan en la ĉielo, kie ŝtelisto ne alproksimiĝas kaj tinoe ne detruas. 34 Ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro.

35 Viaj lumboj estu zonitaj, kaj viaj lampoj estu brulantaj; 36 kaj vi mem estu similaj al viroj, kiuj atendas sian sinjoron, kiam li revenos de la edziĝa festo; por ke ili tuj malfermu al li, kiam li venos kaj frapos. 37 Feliĉaj estas tiuj servistoj, kiujn la sinjoro, kiam li venos, trovos viglaj; vere mi diras al vi, ke li sin zonos, kaj sidigos ilin por manĝi, kaj mem venos kaj servos al ili. 38 Kaj se li alvenos nokte dum la dua gardoparto, aŭ dum la tria gardoparto, kaj tiel ilin trovos, feliĉaj estas tiuj servistoj. 39 Sed sciu, ke se la domomastro scius, je kioma horo la ŝtelisto venos, li maldormus kaj ne lasus sian domon trafosiĝi. 40 Vi ankaŭ estu pretaj, ĉar en tiu horo, kiun vi ne pripensas, la Filo de homo venos.

41 Kaj Petro diris: Sinjoro, ĉu vi parolas ĉi tiun parolon por ni, aŭ ankaŭ por ĉiuj? 42 Kaj la Sinjoro diris: Kiu do estas la fidela kaj saĝa administranto, kiun lia sinjoro starigos super sia servantaro, por doni al ili ĝustatempe ilian porcion da nutraĵo? 43 Feliĉa estas tiu servisto, kiun lia sinjoro, veninte, trovos aganta tiel. 44 Vere mi diras al vi, ke li starigos lin super ĉio, kion li havas. 45 Sed se tiu servisto diros en sia koro: Mia sinjoro prokrastas sian alvenon; kaj komencos bati la knabojn kaj la knabinojn, kaj manĝos kaj trinkos kaj ebriiĝos, 46 la sinjoro de tiu servisto alvenos en tago, kiam li ne atendas, kaj en horo, pri kiu li ne scias; kaj tranĉe skurĝos lin, kaj difinos por li parton kun la senfiduloj. 47 Kaj tiu servisto, kiu scias la volon de sia sinjoro, kaj nenion pretigis, nek faris laŭ lia volo, suferos multajn batojn; 48 sed tiu, kiu ne scias, kaj laŭ siaj agoj meritis batojn, suferos malmultajn batojn. Kaj al kiu multo estas donita, el tiu estos multo postulata; kaj al kiu oni multon komisiis, el tiu oni des pli multon postulos.

La oboe al la forestanta mastro estas unue oboe ne vidata, ne videbla, ne rimarkenda. Tio estas oboe en fido kaj espero.

La patriarkoj, kiam ili obeis, kiam ili foriris, kiam ili ekiris, ne sciis kien iri, ne sciis, kion ili trovos ĉe la fino, sed ili faris tion, kion Dio atendis de ili, ne por esti vidataj, ne por esti laŭdataj, sed nur per fido; kun ĉi tiu certeco, ke la vorto de ĉi tiu Dio vokis ilin, kaj diskrete akompanis ilin, ke ĉi tiu vorto estas fidinda, sen alia pruvo ol ĉi tiu interna konvinkiĝo.

Se ni diras, ke Dio akompanas nin, ke Kristo vivas en ĉiu el ni, kiel Paŭlo diras, ke ni estas ĉiu la templo de la Sankta Spirito, ni ne havas alian pruvon ol ĉi tiu interna konvinkiĝo, ol ĉi tiu certeco enradikiĝinta en nia plej profundaĵo, mal-longe dirite ol ĉi tiu fido, kiu loĝas en ni.

En la parabolo de la saĝa administranto, ni komprenas, ke ĉi tiu homo tre bone povus agi, kiel li volus, pensante pri sia propra profito ĉar la mastro estis for. Sed jen, se li estas fidinda, la mastro scias, ke tiu agos precize kvazaŭ li mem estus ankoraŭ tie, ke lia foresto ne faras diferencon.

La Regno ankaŭ estas respondeco, kiun la Sinjoro lasas al ni. Nia mondo, la homoj ĉirkaŭ ni, kaj la aliaj malproksime, estas parto de la ŝarĝo transdonita al la Eklezio kaj al la kredantoj. Dio ne estas videbla, almenaŭ dum liaj infanoj ne videbligas lin. Kia estas nia fido? Kion ni ricevis? Ĉu ni ricevis nur por ni mem, aŭ ĉu ni ricevis por redoni, por doni, por doni vivon kaj konsiston al la Regno, al ĉi tiu Regno, kiun Li donis al ni, pri kiu li donis al ni la respondecon, la ŝarĝon?

Nia fido estas la atesto de aferoj nevideblaj, la realo de tio, kion ni esperas, kie ni metas nian trezoron, ĝi

estas la sola sekura investo. Kaj nia fido ne estas nur por ni. Ĝi montras al ni, ke tio, kion ni ricevis por kelka tempo, estas tio, kion ni devas dividi, redoni, obeante, servante, kaj per tio ni trovos trezoron aliloke, trezoron en la ĉielo, trezoron, kiun nenio povas forpreni de ni. Kaj vi bone scias, ke kion ni donas, tion neniu plu povas forpreni ĝin de ni.

Nia fido, nia konfido, ne povas esti metita en aferojn kiuj pasas, kiuj povas malaperi, en aferoj, kiujn ni devos forlasi iam. Nia fido, nia espero estas aliloke, en ĉi tiu amo, kiun Kristo montris al ni, en ĉi tiu amo, kiun li invitas al ni dividi, en ĉi tiu amo, kiu neniam povas esti forprenita de ni, en ĉi tiu amo, kiu portos nin eĉ preter nia ekzisto, kiun ni portos eĉ preter nia ekzisto. Ĉi tiu servo, ĉi tiu Regno kiun ni estos vivintaj, en obeado kaj fido, en espero kaj amo, ĝi ankaŭ akompanos nin por ĉiam.

La peco de Jehezkel, kiu estis legata pli frue, ne diras ion alian. Se la virtulo, kiu elektis justan vivon, ekfalas, eraras



pri la trezoro, la fido, la espero, tiam li estos kiel iu, kiu ĉiam vivis en peko. Aliflanke, se iu, kiu, post eraro pri peko kaj maljusteco, ekelektas justecon, fidon, obeon, tiam li estos kiel iu, kiu elektis por ĉiam fidon, vivon, justecon. Li vivos. Dio ne atendas de ni perfektan vivon. Li proponas al ni sian justecon, li volas doni al ni sian justecon, kiel nova veston. Ni devas ekpreni ĝin kun fido. Dio rememorigas nin, ke lia deziro ne estas la morto de la malbonulo, sed ke tiu revenu el sia malbona vojo kaj vivu.

Tiu, kiu komprenas tion, kion Dio atendas de li, kiu havas la internan konvinkon pri tio, sed kiu ne faras tion, kion Dio esperas, ĉi tiu eraris pri trezoro. Li havis la eblecon de la trezoro de Dio, sed li preferis la pereeblan trezoron, kiu estis ŝteblebla, portempa, kaj ankaŭ vidos

lian vivon preni la direkton al puno, al senrimeda perdo. Do tiu, kiu ricevis multon, estu ankaŭ tiu, kiu donas multon, ĉar li ankaŭ estas tiu, al kiu oni multe petas.

Kie estas via trezoro, tie ankaŭ estas via koro. En kiun trezoron vi metas vian konfidon, vian fidon? Ĉu ankoraŭ en trezoro kiu fuĝas inter la fingroj kaj kiu garantias nenion, kaj kiu povas konduki al morto, kiu kondukas al nenieco? Aŭ ĉu vi preferas ĉi tiun neelĉerpeblan trezoron, kiu neniam povas esti prenita de vi kaj el kiu vi povas konstante tiri por redoni, servi, iri antaŭen, porti ĉi tiun Regnon donitan al vi?

Do, pretiĝu, kun zono ĉe la lumboj kaj kun lumantaj lumoj. Amen

☪

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

15. oktobro

Viviganta Spirito, nur en Vi estas la vera vivo. Ni bone komprenu tion. Ekster Vi nia laboro estas vana. Benu tamen ĉiujn, kiuj ne konas Vin. Ni ne ĝenu ilin por ekkoni vin.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Kompreni, protesti, engaĝiĝi

Konkludoteksto de kolokvo en Strasburgo 2004

Raportis Philippe Cousson, FR

*Kolokvo: Kristana fido kaj ekstrema dekstro,
Strasburgo, 29a de januaro ĝis la 1a de februaro 2004.*

Nia socio kaj nia homaro generas politikan, ekonomian kaj religian ekstremismojn.

Ni komprenas la malfacilon vivi inter ni, agnoskante diferencojn en kulturoj, kutimoj kaj vivstiloj. Ni dividas la timon de nekonateco, perforto kaj deliktado en niaj urboj kaj kamparoj.

Ni komprenas la konfuzon de tiuj, por kiuj la mondo ŝanĝiĝas tro rapide, kaj kiuj timas perdi sian lokon en la socio. Ni dividas ilian timon forgesiĝi sur la vojrandoj de historio, forlasitaj al sento de senpoveco fare de la ekonomiaj, politikaj kaj amaskomunikilaj agantoj.

Ni komprenas la konfuzon de la ekzilitoj, kiuj malfacile trovas sian lokon kaj ne sentas sin respondecaj partoprenantoj en nia socio. Ni dividas la malfacilecon esti fremduloj en nova lando aŭ perditaj en nia propra lando.

Sed sen provi batali la homojn, estas ideoj kaj kondutoj, kiujn ni ne akceptas. Ni malakceptas la ideon, ke tiu, kiu estas fremda al ni, estus la kaŭzo de ĉiuj niaj misfortunoj, kaj ni malakceptas la

aserton, ke la diferencoj inter homoj legitimas ekskludon kaj malamon. Ni rezistas al la fortoj, kiuj detruas la fundamentajn orientiĝojn de nia socio, homajn rajtojn kaj demokration. Ni rezistas la malestimon pri la politika tasko, tiu de la respondeca organizado de nia komuna vivo.

Ni malakceptas plurrapidecan socion, kiu estas fonto de multaj ekskludoj. Ni malakceptas la vidadmanieron de la homa estaĵo reduktita al individua produktanto kaj konsumanto, disigita de iu ajn komunumo, same kiel senigita de pasinteco kaj estonteco. Ni rezistas la dion-monon, la logikon de la merkato, la cinikan komercon de la morto, la komercigon de la homa estaĵo.

Ni rifuzas kredi, ke nenio povas esti farata por plibonigi la komunuman vivon en niaj najbaraĵoj kaj en nia lando.



Ni rezistas la tenton retiriĝi en ni mem, kiu estas eĉ vivata en niaj Eklezioj, kiam ili rezignas pri oferado de servo, de komunumo kaj vorto meze de la vagado de niaj samtempuloj. En la bataloj kaj perpleksecoj kiujn ni dividas kun aliaj, kun nia aparta fido, ni asertas:

Ni kredas je Kristo, proksima al ĉiu homo. Sur la kruco, li bonvenigas lin en tio, kio igas lian vivon tragika aŭ ridinda. En Li, per lia releviĝo, ni havas la certecon de la amo de Dio por ni, por la fremdulo en niaj muroj, kaj por tiu, kiu sin lasas tentata de malamo kaj malakcepto.

Ni kredas, ke Dio kreis ĉiun en ties diferenco, en ties homa riĉeco kaj en ties nereduktebla digno. Bonvenigante la tutan kreon kiel donacon, ni ne vidas monotonecon aŭ grizecon, sed fekundan variecon kaj stimulantan diversecon.

Ni kredas je la Spirito, kiu ne unuformigas la mondon kaj la homojn en totalisman kaj tutmondiĝintan mondon, sed kiu kreas la Eklezion. Li kreas komunumon, kie ĉiu aŭdas la vorton en sia patrina lingvo, kaj kunigas universalan homaron. Li kunlaborigas ĉiun por sia amprojekto, kia ajn estas ties kompetenteco.

Ĉar ni estas nek pli bonaj nek pli malbonaj ol la aliaj homoj, ni kunplektiĝas kun ili. Ni volas aŭskultadi

tiujn, kiuj ne povas esprimi sin en nia socio, ĉar ili ne estas agnoskitaj pro tio kio ili estas, ĉar ŝanceliga estas ilia kono de nia lingvo, ĉar ili ne kapablas eliri el mortigaj silentoj aŭ dividi pezajn memorojn. Ni engaĝiĝas por helpi ilin aŭdigi siajn voĉojn.

Ni volas partopreni en la konstruado de komuna estonteco kaj vivebla socio por ĉiuj, ĉiu sianivele. Ni engaĝiĝas por krei renkontiĝon en niaj najbarecoj aŭ vilaĝoj, por partopreni en la serĉado de solvoj al la sociaj problemoj, en politikaj instancoj kiuj estas niaj. Ni engaĝiĝas por instigi alternativajn ekonomiajn formojn, justecajn rilate al interŝanĝoj kun proksimuloj kaj malproksimuloj. Ni engaĝiĝas por konservado de la naturo por permesi vivi al la infanoj de niaj infanoj.

Ni komprenas,
ni rifuzas,
ni kredas,
ni engaĝiĝas.

Dio helpu nin!

Colloque: Foi chrétienne et extrême droite

[Kolokvo: Kristana fido kaj ekstrema dekstro],
Strasburgo, 29a de januaro ĝis la 1a de februaro
2004.

La franclingva dokumento trovebla ĉe:
<http://www.protestants.org/>

Gaja historio kun serioza instruo

Artikolo de József Farkas 20an de septembro 1964

Tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

En Kanado okazis fortaj pluvegoj kaj sekve torentoj kaj inundoj. Unu indiĝenan vilaĝon tute ĉirkaŭis la rivero kiu fariĝis preskaŭ maro. La ŝtataj aŭtoritatoj devis kalkuli per tio, ke la pli kaj pli alta akvonivelo fine forlavos la tutan vilaĝon, do ili decidis ke la tutan loĝantaron oni urĝe forkunportu el tiu danĝera loko. Oni devis peti helpon de la armeo, kiuj per helikopteroj kunportis la loĝantojn al sekura loko. Post certa tempo la pilotoj, kiuj kunportis la homojn, havis la senton, ke io ne estas en ordo. Ili diligente kaj sinofere kunportas la homojn, sed tamen surprizige multaj homoj estas daŭre en la vilaĝo! Ili komencis kalkuli la jam kunportitajn homojn, kaj malkovris, ke pli multajn homojn ili forkunportis jam, ol kiuj origine vivis en al vilaĝo! Rapide ili malkovris la kaŭzon de la „miraklo”: la indiĝenoj tiel multe ĝuis la flugon per la helikoptero, ke kiujn ili jam forkunportis, sekrete per kanuoj reeniris al la danĝera vilaĝo, ke oni ankoraŭ unufoje savu ilin.

Do ili ĝuis tion, ke fortaj kaj kuraĝaj pilotoj per nekonata, stranga fluganta ilo, kiun oni neniam vidis antaŭe, savu ilin el la inundo, kaj denove kaj denove ili volis travivi tiun ĝojon.

Ĉu ne multaj kristanaj homoj faras same? Ili ĝuas la liberigadon de Dio, la indulgon, la pekardonon kaj denove kaj denove volas travivi la ĝojon de tio. La „grandaj inundoj” – la ondoj de kulpoj, malsanoj, suferadoj – minacas ilin per forlavado, sed jen, aperas la savantaj grupoj: la kristanaj gefratoj, kiuj per granda sindono okupiĝas pri ili. Paroladas kun ili, konsolas ilin, helpas al ili, kunportas ilin al sekura loko.

Estas bona sento, ke mia afero estas grava afero, kaj ke multaj homoj prizorgas min, okupiĝas pri mi. Kiujn Dio jam helpis eliri el la ondoj de ilia antaŭa vivo, kaj metis ilin al la ordo de servanta vivo, ankaŭ tiuj volonte „reenremas” kelkfoje al la malnova „vilaĝo”, ĉar estas bona sento, ke oni denove kaj denove savas ilin el la danĝeraj ondoj.

En ĉiuj komonumoj estas homoj, kiuj tiam fartas bone, kiam ili ĵus estas savataj el la grandaj akvoj. Kutime ili ĉi tiel petas helpon: mi perdis mian ĝojon – venu, miaj, gefratoj, kaj konsolu min! Mi estas senforta – venu kaj fortigu min! Mi denove dubas – venu kaj kreskigu mian kredon!

Kompreneble ni devas plenumi tiun ĉi servon al niaj gefratoj. Sed ni tamen devas klare vidi, ke la vivo de la eklezio ne estas tiu ĉi senfina rondirado: supren-

leviĝo el la profundo, kaj poste silenta sekreta reeniro al la profundo por denova ebleco leviĝi el tio. La esenco de la kristanismo multe pli multe estas tio: per la mizerikordo de Dio savitaj vivoj persiste servu al aliuloj. Unue la fortaj, certaj „pilotoj” helpas al ni leviĝi el la minacaj ondoj de nia anima vivo, el la torento de timoj, flamoj, pasioj, malamoj. Sed poste ni mem devas fariĝi „pilotoj” kaj devas labori por tio, ke ankaŭ aliajn homojn ni starigu al la

sekura grundo de la sobreco, homeco kaj amo.

Estas pli granda ĝuo, se iu zorgas pri mi, ol se mi devas porti la zorgo-pezon de aliuloj. Sed fine Dio ne vokis nin al senfina, dumviva ĝuado, sed al servado. Se ni akceptas tiun ĉi pli altnivelan vivmanieron, ni spertos: ankaŭ el tio ne mankas ĝojoj! Tiel ni povas sperti la ĝojon de Jesuo Kristo: pli bone doni ol ricevi!

☪

Orm la Ruĝa – du volumoj

Recenzo

Gerrit BERVELING, NL

Unualoke mi tuj diru, ke jen mirinde leginda verko! Temas pri la malnovaj vikingoj. Pri ili kompreneble mi sciis, ke estas kuraĝaj mar-veturantoj, homoj kiuj neniel for-timiĝis de distancoj aŭ aĉa vetero ... Laŭdire eĉ Amerikon ili jam alnavigis longe antaŭ Kolombo.

Sed kvazaŭ kunvojaĝi estas alia afero ...

Nacilingve sufiĉe ofte tradukojn oni faras en grupa kunlaboro; kutime ĉe ni en Esperanto verkon tradukas unu persono, tre malofte kelkaj kunlabore, sed ĉe ĉi tiu *Orm* temas pri speciala historio: unue aperis en 1989 la unua

volumo, tradukita el la sveda de Bertil Nilsson; la poeziajn partojn tradukis William Auld; lingve kontrolis Wouter Pilger. Nilsson kaj Auld kunlaboris antaŭe minimume ankaŭ en libro, kiu aperis en 1978: Harry Martinson – *Aniara*, serio Oriento-Okcidento nr 14. Nun en 2019 aperis la dua volumo de *Orm la Ruĝa* en traduko de Sten Johansson.

Mi tre bone povas kompreni, ke tiu ĉi aventuroplena romano aperis en minimume 24 tradukoj. Tion certe ĝi meritas.

En la unua volumo la protagoniston oni akompanas en ekspedicioj orienten fine de la deka jarcento, en la jaroj 982–

991, el kio rezultas poste eĉ kelkaj jaroj kiel sklavo en la Maŭra Andaluzio, kaj edziĝo al la filino de la Dana reĝo Harald Bludenta. Por Esperantistoj certe atentoveke estas, kiel diversaj fariĝas foje la homaj sortoj pro ilia lingvokono; kelkajn rekte savas ilia lingvoscio. Judo, kiu unue rolis kiel sklavo, poste montriĝas gravulo en malsama medio. El malnovaj rakontoj mi konas la kutimon doni nomon al sia glavo. Tre belan nomon mi trovas, “lulkanto” — je paĝo 108.

Speciale atentokapta mi trovis tutan alineon je paĝo 118, kie oni klarigas metrikon de la uzata poezio.

Estas tre ĝojinde, ke nun fine aperis la dua volumo de la verko.

La dua volumo unue rakontas pri la vivo inter la vikingoj mem, kaj poste kiam oni tre amare ekscias pri la vivado en la Orient-kristana Imperio, kie tre malinde oni mistraktas kontraŭulojn, fortranĉante langon, okulon kaj manon, kio instigas al vikinga ekspedicio al la lando de la bulgaroj por konduki “hejmen” trezoron el oro kaj juveloj k.s. La tuto fariĝas vere mirinda aventurromano, kiun tre ĝue oni legas.

Je paĝoj, 59–61 oni legas pri la latina aŭtoro Ovidio, kiun monaĥo tie legas, komparante lin kun Jozefo kaj la edzino de Potifar en la Biblio. Amuze, kiel ĉi tie interplektiĝas miskomprenoj pri kulturoj.

Je paĝo 64 oni kvazaŭ flanke povas konkludi, ke fraŭleco por pastroj katolikaj ankoraŭ ne ĉie estis devigita — kio ankaŭ ĝustas, ĉar la celibato nur post Trento ĉie fariĝis deviga. Legu pli atente la historion de la eklezio!

Tre legindas la ampleksa sceno depost paĝo 84 pri la praa oferado-ceremonio de la vikingoj. Tiun por ni nunuloj tre foran kulturon la aŭtoro scias tre inde priskribi.

Je paĝo 90 la arablingvan kredkonfeson el la Korano oni tre kristane klarigas — bela ekzemplo pri ofta miskompreno inter religioj.

Paĝo 99 k.s. la kunveno komenciĝas per paroladoj de ĉefuloj — kvankam en malsama medio kaj malsama epoko, ho kiom parence al la nord-amerikaj indianoj!

Entute mi konklude diru, ke jen tre leginda verko, pri kies finfina apero en nia lingvo nia publiko nur povas ekĝoji!

☪



El Vikipedio:

Frans Gunnar BENGTTSSON (naskiĝis la 4an de oktobro 1894 en Tossjö, mortis la 19an de decembro 1954 en Ribbingsfors palaceto) estis sveda verkisto. Plej konata estas lia legendo-romano Röde Orm [Orm la ruĝa] pri vikingoj. Ankaŭ liaj eseoj havas ĉefe historiajn temojn.



Fake News [fejk njus] – falsaj novaĵoj

Prelego dum la kongreso en Révfülöp 2019

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Hodiaŭ la informa fluo superverŝas nin. Aŭ tra tradiciaj komunikiloj, ekz. televido, radio, gazetoj, aŭ tra modernaj retaj komunikiloj ekz. Facebook, Twitter, Instagram, blogoj, Youtube [jutubo] k.t.p.

Ni nek volas, nek povas eviti tiun verŝadon, sed antaŭ kelkaj jaroj famiĝis la esprimo *fake news* [fejk njus] – falsaj novaĵoj – kaj denove evidentiĝis, ke ni ne povas fidi ĉiun informon. La batalo, kiel kompreni la realecon, estas vigla. Ni devas singarde taksu mesaĝon antaŭ ol ni kredas ĝin kaj eble pluensendas ĝin al geamikoj, ĉar falsaj novaĵoj, konspiraj teorioj kaj torditaj rakontoj superŝutas nin. Ni vivas en tempo, kiun ni povas nomi ”tempo de post-vero kaj alternativaj faktoj”.



Maldekstre instalado de Obama kaj dekstre de Trump

Konata estas la ekzemplo de la instalado de Trump kompare kun tiu de Obama. Tiam oni prezentis “alternativan fakton” dirante, ke pli multaj homoj ĉeestis dum la instalado de Trump, kvankam statistiko kaj la bildoj montras ion alian.

Kelkaj proponitaj difinoj de falsaj novaĵoj estas: “falsaj informoj, kiuj estas prezentitaj kiel novaĵoj”; “falsaj disvastigitaj kiel veroj en/per la amaskomunikiloj”; “intence falsaj informoj”.

Kutime falsaj novaĵoj baziĝas sur io, kio efektive okazis, sed la klarigo pri la okazaĵo estas tordita aŭ malĝusta aŭ la falsa novaĵo estas tendence elektita, en kiu priskribo kaj substreko de certaj veroj kaj ignoro de aliaj, donas ne ĝustan komprenon al la aŭskultanto/leganto.

Ekzemplo: Ekstremdekstraj amaskomunikiloj en Svedio skribis, ke la ŝtata aŭtoritato malpermesis kristnaskajn dekoraciajn lampojn sur iliaj lanternofostoj, por ke la islamanoj fuĝintoj ne estu ofendataj.



Fakto: Jes, kiam la respondeco pri la lanternofostoj estis transdonata de la urba aŭtoritato al la ŝtata aŭtoritato, la kromaj dekoraciaj lampoj estis vere malpermesitaj. Tio okazis pro leĝoj pri elektro kaj sekureco kaj havis neniun rilaton al fuĝintoj aŭ religio.

Alia ekzemplo: Sur la suba bildo estas svede skribita ke “unu el tiuj ĉi manĝaĵoj estas senpage donita al rifuĝintoj, la alia al pensiuloj en maljunulejo por 80 SEK [= 8 €]. Divenu kiun?”

Fakto: la supra manĝaĵo troviĝas sur blogo pri kuirado kaj la suba estis donita al loĝantoj en azilejo.



La spertuloj opinias, ke tiuj, kiuj produktas *fake news*, ne intencas ekscii, kio vere okazis, sed havas aliajn intencojn, eble allogi pli da reklamantojn, krei politikajn dividojn aŭ stiri certan politikan tagordon.

Fake news ne celas disvastigi (respektive akiri) sciojn, sed ili volas disvastigi mesaĝojn, kiuj favoras la propran opinionan flankon.

Fake news ne estas ĵurnalismo. Ne temas pri provi ekscii la veron, por kontroli datenojn kaj taksi fontojn – temas pri diskonigi mesaĝon en tia maniero, ke ĝi kaŝas la veran intencon.

Ne eblas diri, ke *fake news* en sia enhavo ĉiam kaj tute estas malveraj, sed eblas diri, ke ili estas ne-sinceraj kaj malaŭtentikaj novaĵoj.

Samtempe ni devas diri, ke la kontraŭo, do sinceraj kaj aŭtentikaj novaĵoj, eble enhavas erarojn kaj malverojn. Tamen tio ne farigas ilin *fake news*.

Laŭ esploristo Claire Wardle, en First Draft News, troviĝas 7 specoj de falsaj novaĵoj, nome:

- satiro aŭ parodio (ili ne intencas kaŭzi damaĝon, sed havas eblecon/riskon trompi)
- falsa rilato (kiam titoloj, vidaĵoj aŭ apudskriboj ne subtenas la enhavon)
- misgvida enhavo (misgvida uzo de informoj por troigi problemon aŭ fifamigi individuon)
- falsa kunteksto (kiam vera enhavo estas dividita kun falsaj kuntekstaj informoj)
- trompa enhavo (kiam aŭtentikaj fontoj estas anstataŭigitaj per falsaj, inventitaj fontoj)
- manipulita enhavo (kiam aŭtentika informo aŭ bildoj estas manipolitaj por trompi)
- konstruita enhavo (nova enhavo estas 100% falsa, kreita por trompi kaj damaĝi)

Laŭ aliaj esploroj pri Twitter, falsaj novaĵoj multe pli rapide disvastiĝas. Mezume aŭtentika novaĵo bezonas sesoble pli longan tempon por atingi 1500 homojn.

Ni devas kompreni, ke NI, la uzantoj de interreto, disvastigas la novaĵojn – ankaŭ la falsajn! La informo ne mem klakas la send-butonon.

Novaĵoj
ĝenerale estas
karakterizataj
de:

- Gravaj (kunlige kun samtempaj okazajoj, ekz. politikaj eventoj)
- Freŝaj
- Proksimaj tempe kaj loke
- Nekutimaj

La kaŭzo, kial ni uzantoj pli facile disvastigas falsajn novaĵojn, estas, ke la falsaj novaĵoj ŝajnas pli "novaj", kaj ni homoj estas logataj de la nova.

Falsaj novaĵoj estas ankaŭ perceptataj kiel pli surprizaj kaj mirigaj kaj ankaŭ, ke falsaj novaĵoj pli ofte kreas negativajn sentojn, timon aŭ naŭzon, kaj tio ŝajne kontribuas al la emo disvastigi la novaĵojn.

Fake media – falsa amaskomunikilo
Kiam ni parolas pri *fake news*, ni ankaŭ devas paroli pri *fake media*. Oni ne nur disvastigas ne-aŭtentikan informon – oni ankaŭ provas senkreditigi la fontojn de aŭtentikaj novaĵoj.

Anstataŭ kontraŭi la faktojn, kiujn ĵurnalistoj aŭ esploristoj eldiras, oni dubigas ilin aŭ la instituciojn kiujn ili reprezentas. Tio okazis/okazas fare de la usona tabaka industrio kaj de la negantoj de klimatsanĝo. En Rusio Aleksej Navalnyj, kiu forte opozicias Putinon, antaŭ kelkaj semajnoj estis kaptita, ĉar oni diras ke lia anti-korupcia fondaĵo lavas monon.

Trump, kiam li ne ŝatas la informon de la gazetoj, li tuj esprimas, ke la gazetoj estas malhonesta kaj *fake media*. Li eĉ donis premion al la "plej malhonesta kaj korupta amasinformilo dum la jaro".

Io simila okazas en Svedio, per iom malpli fortaj esprimoj, ĉe la ekstremdekstraj partioj. Unu gvidanto eldiris, ke li, se li gajnos la ĝeneralan elekton, li tuj fermos publikan televizian kanalon, ĉar ĝi ne prezentas la veron.

Lige kun tio estas la ideo pri iu malantaŭa konspiro, ke iu potenco malantaŭe havas politikan strategion kontraŭ la intereso de la popolo. Samtempe oni povas prezenti sian propran rakonton pri la "vera situacio", ekz. ke la enmigrintoj estas teroristoj, kunportas malsanojn, kaj ke la propra kulturo malaperos k.s.

Tio ne estas farita nur fare de krimuloj. Laŭ esplora eltrovo en 2017 kaj laŭ oficialaj dokumentoj, entute 28 landoj havis "gravajn programojn por manipulado en sociaj amaskomunikiloj".

Sekvoj

Estas granda risko, ke ni perdas la fidon je amasinformiloj. En Usono oni trovis, ke el tiuj, kiuj antaŭe voĉdonis por Obama kaj kiuj ankaŭ kredis iujn el la falsaj novaĵoj, nur 17 % voĉdonis por Hilary Clinton.

En Svedio ni scias, ke antaŭ nia ĝenerala elekto 2018 agis multaj naciaj kaj internaciaj agantoj, kiuj disvastigis falsajn novaĵojn. Ne estas konate en kioma grado tio influis la finan rezulton.

Sed estas konate, ke ni tro taksas nian kapablon distingi inter falsaj kaj aŭtentikaj novaĵoj. En brita esploro nur 4 % kapablis distingi inter ili.

Kontraŭago

Se ni uzas reton, ni provu ne disvastigi falsajn novaĵojn, Ni ĉiam pripensu la jenon:

- pripensu la fonton (komprenu ĝian mision kaj celon)
- legu ne nur la titolon (por kompreni la tutan historion)
- kontrolu la aŭtorojn (ĉu ili estas veraj kaj kredindaj)
- taksu la subtenajn fontojn (ĉu ili subtenas la asertojn)
- kontrolu la daton de publikigo (ĉu ĝisdatigita)
- ĉu ĝi estas ŝerco (por determini, ĉu ĝi celas esti satira)
- reviziu viajn proprajn inkliojn (eble ili influas vian juĝon)
- petu spertulojn (por konfirmo de homoj, kiuj scias)



B O Āradsson prelegas. Fotis Václav Pospíšil

Eble estas saĝe ankaŭ kontroli la daton, ĉar la 1an de aprilo aperas multaj strangajĵoj, kiuj povas trompi onin. Mi mem spertis tion en 2017, kiam venis (stranga) mesaĝo de kredinda amiko:

Okaze de la jubilea jaro (500 jarojn reformacio en Germanujo) la Luterana Tutmonda Federacio (Lutheran World Federation, LWF) proklamas planan indulgencon por ĉiuj kristanoj, kiuj en 2017 pilgrimas al la Luterurbo Wittenberg, tie en la Kastela Kirko vizitas la tombon de Marteno Lutero kaj enmetas siajn donacojn en la mon-keston (kp. Luk 21,1-4). ...

Ĝenevo, en la luter-jaro 2017

D-ro Anu O' Lirpa, prezidanto de LWF

Kiam venis tiu mesaĝo, estis tempo por prepari nian gazeton, kaj mi volis enmeti la informon, ĉar a) ĝi rilatis al Marteno Lutero, b) estis la reformacia jubilea jaro kaj c) ofte mankas al mi materialon por publikigo. Sed, unue mi volis trovi konfirmon pri la mesaĝo tamen ege stranga. Al protestantoj sendi proponon pri indulgenco kontraŭ mono? Sed la sendinto estis ege kredinda. Nenie mi trovis konfirmon.

Kiam mi preparis la jenan prelegon, du jarojn poste, mi vidis la daton! Mi demandis la mesaĝsendinton, kaj li konfirmis ke estis ŝerco pro la unua de aprilo! Se vi atente kaj inverse legas la nomon de la prezidanto de LWF vi vidas klare *april'O unuA*.

Konklude: vi ĉiam devas esti singarda, ĉar eĉ de fidindaj fontoj povas veni “falsa novaĵo” – aŭ estas la 1a de aprilo.

Apostoloj kaj iliaj atributoj

Prezentita dum la ekumena kongreso en Poděbrady 2018
kvina parto

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Mateo


Mateo devenis el Kafarnao, kie li laboris kiel impostisto – pro tio estas lia atributo la (mon)burso aludanta pri lia civila profesio.

Post la morto de Jesuo li forlasis Judeon kaj iris labori al Etiopio. Oni devigis lin, ke li malkonfesu sian kredon, kiun li ne faris, kaj oni torturis lin ĝis la morto.

Mateo estas evangeliisto (al tio post la nuna artikol-serio mi revenos).

Sankta Hieronimo (Ĵeromo) skribas en unu de siaj verkoj: „Mateo, kiun oni nomis ankaŭ Levi, kaj kiu el impostisto fariĝis apostolo, unue en la hebrea lingvo, per hebreaj literoj skribis la evangelion pri Jesuo en Judeo.” Tiu ĉi originala teksto ankoraŭ ekzistis en la kvara jarcento en Cezareo. Sed ankaŭ Eŭsebio aludas pri tiu ĉi evangelio, kiu estis la unua skribita, inter la kvar evangelioj, ĉirkaŭ 41 p. Kr. Verŝajne Mateo mem tradukis tiun al la greka lingvo, kiu tiutempe estis la lingvo de la klereco.

Lian evangelion ĉirkaŭ la jaro 50 oni trovis kune kun la ostoj de Sankta Barnabaso. La evangelion Sankta Barnabaso kunportis kun si mem ĉien, kaj metis ĝin sur la malsanulojn, kiujn la libro tuj resanigis el la malsanoj.



Jesuskirken, Kopenhago,
fino de 19a jarcento

Skulptaĵo de la hungara
skulptisto István Rohonczi
(1957-) en la hungara
vilaĝo Apostag



Baziliko de Sankta Johano en Laterano
Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)





En preĝejo en la vilaĝo Habo en suda Svedio, ĉirkaŭ 1723



Antal Károly hungara skulptisto (1909-1994), Pécs

Jakobo (la pli juna)

En la nomlisto de la apostoloj li estas en la naŭa loko. Pro la alia Jakobo li ricevis la aldonitan nomon. Mateo alnomas lin filo de Alfeo.

Tiu ĉi nomo estas sufiĉe malcerta tamen, ĉar krom en la nomlisto nenie la Nova Testamento mencias Jakobon.

La frua tradicio opinias, ke li estas identa kun tiu Jakobo, kies patrino ĉe-

estis la krucumadon de Jesuo, sed tio ne estas pruvebla.

Pri lia martira morto oni tion scias, ke iu drapa (tipo de teksaĵo) prilaboristo mortbatis lin per sia ilo, kiam oni elĵetis lin el la jerusalema preĝejo – pro tio estas lia atributo tiu ĉi ilo aŭ klabo.

Daŭrigota



Baziliko de Sankta Johano en Laterano Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)

ĉirkaŭ inter 1480 kaj 1489



La vibrisoj de katoj

Kompilis Mark HAMME, Usono

La hejmaj katoj kutimas esti noktaj estaĵoj kaj ĉio indikas, ke iliaj vibrisoj funkcias por detekti proksimajn objektojn kaj ĉasi dum mallumo.

Pensu pri la jeno: la vibrisoj de katoj estas konektitaj al reto de sensilaj nervoj, kiuj ebligas la katojn percepti eĉ la plej leĝeran moviĝon de aero. Pro tio katoj scias, kiam ili estas proksimaj al objekto, kvankam ili ne vidas ĝin. Tio estas favora dum mallumo!

Katoj povas ankaŭ determini precize la lokon kaj movon de objekto aŭ predobesto pro la fakto, ke ĝiaj vibrisoj detektas ŝanĝojn de aerpremo. Vibrisoj ankaŭ ebligas la mezuron de aperturo por determini ĉu kato povas trapasi. La Encyclopædia Britannica agnoskas, ke "la funkcio de la vibrisoj de kato ne estas entute komprenataj; malgraŭ tio, estas

sciante, ke se la vangharoj de kato estas detranĉitaj, ĝi intertempe malkapabliĝas.


La sciencistoj estas konstruantaj robotojn, kiuj havas sensilojn kiuj similas al la vibrisoj de la katoj. Tiuj elektronikaj vibrisoj permesas, ke la robotoj evitu obstaklojn. Laŭ Ali Javey, esploristo de la universitato de Berkley, Kalifornio, tiuj sensiloj "povus efiki vastan gamon da komunikaĵoj inter maŝinoj kaj uzantoj, ankaŭ por la fako de biologio".

Imagu la kompleksan reton de nervoj kaj la kemiajn substancojn, kiuj komunikas tiom da informoj, kaj la cerbon, kiu povas interpreti tiujn. Tio ne povus esti rezulto de evoluo. Estas manifestaĵo de la scio de Dio. La letero al la romanoj 1,20 diras: "Ĉar liaj nevideblaj ecoj de post la kreado de la mondo fariĝas videblaj, sentate por liaj faritaĵoj, ..."



La bildo montras oscedantan katon, kies vibrisoj estas turnigitaj antaŭen.

Foto de uzanto: pschemp /Wikipedio
propra verko, CC BY-SA 3.0,
<https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=52436>



La kvar knabinoj

Ed BORSBOOM, NL

Dum pentekosto 1954 junaj esperantistoj en Nederlando organizis semajnfinojn en junulargastejo, troviĝanta en la mezo de la lando. Kiel komencanto de Esperanto mi decidis partopreni. Tio signifis, biciklado de 80 kilometroj de mia urbo Hago al tiu kunveno. Post multaj horoj mi atingis ĝin.

Oni povis meti sian biciklon tuj ĉe la enirejo de la tereno en specialan ejon. Hazarde pli malpli samtempe kvar knabinoj de mia aĝo, 16 aŭ 17 jaraj, alvenis kaj ankaŭ enremizigis siajn biciklojn. Ili parolis inter si senriproĉan Esperanton kaj faris tion per belsonaj voĉoj. Tio vere imponis. Mi decidis tuj ankaŭ diri ion en la lingvo de Zamenhof, sed la kvaropo aŭdis mian primitivan lingvo-uzon kaj malaprobe forturnis sin. Ili verŝajne venis por aŭskulti kapablajn samideanojn. Akceptite!

Ilia deziro estis poste plenumita, ĉar la organizantoj estis invitintaj al la studtagoj Norbert Barthelmess el Parizo. Tiu ĉi prelegis dum la sekvonta mateno dum pli ol unu horo. Tion li faris tiel trankvile kaj klare kvazaŭ li uzis sian propran lingvon. Poste mi aŭdis, ke li naskiĝis en Germanio, kie li eklernis Esperanton en 1911. Komence de la dudekaj jaroj li transloĝiĝis al Parizo por konstante labori tie en la SAT-sidejo.

Ĉe la fino de la studtagoj mi denove trafis en la remizejo la kvar knabinojn. Intertempe mi estis aŭdintaj ke ili loĝis en la urbo Amsterdamo. La vojo tien estis komence la sama kiel al Hago. Sekve mi proponis kune bicikli. Ili akceptis tion laŭ tiu divido, ke du knabinoj biciklis en la unua vico, post ili la du aliaj kaj kiel lasta mia persono. Tute en ordo!

Ni forlasis la terenon de la gastejo kaj subite la knabinoj ŝanĝis de Esperanto al la nederlanda lingvo. Okazis vera miraklo. Ilia vortuzo estis tiel ne modela laŭ la normoj de la nederlanda lingvo, ke miaj oreloj kvazaŭ ekdoloris. Estis tro. Mi subite decidis ne akompani la kvaron, svingsalutis ilin kaj forklinis al alia vojeto. Revido neniam okazis. Tion mi nun bedaŭras. ☞



Maldestre: Norbert Barthelmess, Meze: Lucien Bannier, prezidanto de SAT (okt 1979)

Survoje – ien aŭ reen

Kompilis Bengt Olof ÅRADSSON, SE



Vizito ĉe la tombo de Lajos Kóbor

Philippe Cousson kaj Samuel Gaillard havis longan vojon de la hejmo en Francio al la kongresloko en Hungario. Survoje ili tranoktis, en ambaŭ direktoj, ĉe gastiganto de Pasporta servo. Post la kongreso en Révfülöp, la vojo preterpasis en la proksimeco de la tombo de Lajos Kóbor kaj ili kaptis la eblecon kaj okazon viziti ĝin.

Sur la bildo videblas Samuel Gaillard

Vizito ĉe esperantaj geamikoj veturante de Svedio al Hungario

Somere ni aŭto-veturis al Hungario. Estas sufiĉe longa vojo kaj ni eĉ plilongigis ĝin “preterpasante” Nederlando. Tion ni faris, ĉar ni jam longe ne vidis kelkajn karajn geamikojn, kiujn ni antaŭe ekkonis dum niaj kongresoj.

Do ni forlasis Svedion frumatene kaj veturis ĝis la landlimo inter Germanio kaj Nederlando, kie ni tranoktis en malgranda urbeto. En Nederlando ni unue vizitis Groningen, poste ni veturis laŭlonge la marbordon kaj la grandan digon survoje al Heemskerk. Komprenible ni ankaŭ volis iomete vidi Amsterdamon antaŭ ni daŭrigis al Alphen aan den Rijn kaj Zeist. Forlasinte la Benelukso-landojn ni trapasis Heilbronn survoje al Hungario.

Tiu itinero ja ne estis tute hazarda. Krom iom da turismaj agadoj ekz. vizito al la van Gogh-muzeo en Amsterdamo kaj gustumado de vafloj en Bruselo, la plej grava celo estis, ke ni laŭlonge la planitan vojon vizitu Wil van Ganswijk, Vera Tuinder, Els van Dijk, Ed Borsboom kaj Siegfried Krüger.

Kun granda ĝojo ni revidis ilin. Kvankam jam pasis kelkaj jaroj, depost ni pasintfoje renkontis ilin dum kongresoj, ni havis la senton ke okazis hieraŭ.

Bedaŭrinde la tempo ĉi-foje ne permesis viziti aliajn “laŭlongajn” geamikojn



Els van Dijk



Wil van Ganswijk



Vera Tuinder



Ed Borsboom



De maldekstre Ágnes Ráczkevy-Eötvös (sidante), André Aradsson, Bengt Olof Aradsson kaj Siegfried Krüger (sidante)

Alternativoj al MAL-vortoj

El PMEG — plena manlibro de esperanta gramatiko

<https://bertilow.com/pmeg/index.html>

Kelkfoje oni renkontas nekutimajn vortojn, precipe en poezio, anstataŭ la pli konataj MAL-vortoj, kiujn ni lernis komence. La suba teksto, kiu klarigas kelkajn el tiuj vortoj, estas kopiita de PMEG en sia tuteco.

Por multaj MAL-vortoj oni kreis nekunmetitan alternativon. Kelkaj tiaj MAL-alternativoj fariĝis oftaj, dum aliaj aperas precipe en poezio k.s. Ankorau aliaj preskaŭ neniam estas uzataj. Iafoje okazas, ke tia MAL-alternativo evoluas for de la MAL-vorto, kaj ricevas specialan signifon.

Ne regas klara interkonsento pri la uzindeco de tiaj MAL-alternativoj, precipe pri tiuj, kiuj ne ricevis specialan signifon. Kelkaj opinias, ke tiaj vortoj estas ĝenerale evitindaj, dum aliaj trovas ilin akcepteblaj aŭ eĉ uzindaj, almenaŭ en certaj kuntekstoj kaj por certaj lingvaj stiloj. Ĉiuokaze oni ne provu tute forigi la prefikson MAL per tiaj MAL-alternativoj.

Jen kelkaj ekzemploj:

trista (= **malgaja**, malĝoja) – ofte uzata

kurta (= **mallonga**) – sufiĉe ofta en literatura (precipe poezia) lingvaĵo kaj en kelkaj teknikaj kunmetaĵoj (kurtonda radio); krome relative malofta

frida (= **malvarma**) – sufiĉe ofta en literatura (precipe poezia) lingvaĵo kaj en kelkaj kunmetaĵoj (fridujo, fridvagono); krome relative malofta

olda (= **maljuna**) – ne malofta, precipe en literatura lingvaĵo

liva (= **maldekstra**) – iafoje uzata; povas esti tre utila, kiam necesas rapide aŭ ripete doni instrukciojn pri dekstro kaj maldekstro

dura (= **malmola**) – sufiĉe ofta en teknika lingvaĵo; ricevas ofte iom specialan figuran signifon (dura vivo = “malfacila vivo”); ekster la teknika lingvaĵo relative malofta en nefigura uzo

lanta (= **malrapida**) – sufiĉe ofta en poezia lingvaĵo; malofta ekster literaturo

leĝera (= **malpeza**) – ekhavis specialajn figurajn signifojn (leĝera literaturo = “malserioza, senprofunda literaturo”, leĝera infanterio = “facile movebla infanterio kun relative malpezaj armiloj”); por efektiva malpezeco oni uzas preskaŭ nur malpeza

turpa (= **malbela**) – tre malofte uzata
difacila (= **malfacila**) – uzata nur de ekstremistoj (* ne-rekomendinda kaj ne troviĝas en PIV)

Eĉ se iu MAL-alternativa estas taŭga por certaj situacioj, la responda MAL-vorto ĉiam restas tute bona kaj uzinda. Oni ekz. normale uzu maldekstra. Nur en specialaj okazoj, kiam vere utilas, oni uzu la alternativon liva. ☞

Informoj

Overshoot day — la tago de ekologia ŝuldo

La tago de ekologia ŝuldo [angle: Overshoot Day] estis estigita de la brita *New Economics Foundation*, kaj ĝi volas montri, ke kiam tiu tago estas atingita, tiam ni jam konsumis la tutjarajn naturajn rimedojn.


Ĉar konsumado ĉiujare pliiĝas, tiel ni ankaŭ pli rapide atingas la tagon de ekologia ŝuldo.

La dato estas kalkulata komparante la tutan jaran konsumadon de la homaro kun la kapablo de la tero regeneri naturajn rimedojn (biokapacito). Uzante statistikojn de UN, enhavantaj la plej novajn datenojn, la tutmonda ekologia spuro kaj biokapacito estas kalkulata ĉiujare.

La apuda diagramo montras, ke en 2015, ni atingis la tagon de ekologia

ŝuldo la 8an de aŭgusto. En 1990 tiu tago okazis la 7an de decembro.

☞



Festa kongreso en Brno

En la tagoj 18. – 20. 10. 2019 okazis en moravia urbo Brno festa kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Antaŭ 50 jaroj (29. – 30. 3. 1969) same en Brno estis tiu asocio fondita kaj mi estis elektita kiel sekretario de la asocio. Dum la tiama kongresa programo estis fondita sub la gvido de d-ro R. Horský ankaŭ nia Sekcio de kristanaj esperantistoj.

Pavel Polnický

Abrahamo iras for

(originale verkita en Esperanto)

1. Ab-ra - ha-mo___ i - ras for
bil-do de l' e - ter-na glor',
al la lan - do de l' pro - mes',
ki - en mi - gru mi sen çes'.
Tra mi - zer', tra su - fer'
al la hel' de l'___ çi - el'
gvi - dos min la___ Di - a ben',
al___ la land'___ E - den',___
al___ la land'___ E - den'.

2. Harpon pinças Reĝ' David'
kun psalmad', la Jiŝajid'.
Alten al la Dia tron'
ŝvingas sin la pia son'.
Mi en ĝoj' kaj malĝoj,
en malsat' kaj bonstat'
kantu, ludu antaŭ Li,
mia bona Di',
mia bona Di'.

3. Ploras Petro kun amar',
larmas pentoplene, çar
kiun gloris li Mesi',
tiun ĵus perfidis li.
Malkuraĝ', mem-omaĝ'
gvidis al mia fal'.
Mi ekstaru, turnu min,
nove amu Lin,
nove amu Lin.

ABRAHAMO IRIS FOR • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2018-10-07

Kiu verkas pliajn strofojn aplikante ajnan biblian scenon al la propra vivo?